

STARO

N-ro 3/2013 (248)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto: Konica Přerov

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Vladimír Dvořák, Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidantino: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 444 117, vhirsx@email.cz (membrodatabazo, kontado)

Komitatanino: Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (membroj, kluboj, sekcioj, konferencoj, informado, retaj projektoj, ekspozicioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

Revizia komisiono de ĈEA:

Prezidanto: Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

Kontrollegis: Sabine Hauge, la komitato.

UK sur insulo

La ĉi-jara UK en la urbo Rejkjaviko sur la insulo Islando inspiris ankaŭ la ĉefan temon de la kongreso: *Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvo-komunumoj*. Alvenis 1034 partoprenantoj el 55 landoj.

Nova estraro de UEA:

Mark Fettes (prezidanto) gvidas la subteamon "Mastruma Evoluo": Strategia laborplano, financo, Centra Oficejo, kongresa politiko, TEJO, CED, uea.org;

Martin Schäffer (ĝenerala sekretario): Komitato, komunika politiko, Delegita Reto, financo kaj administrado (kunlabore kun Fettes);

Stefan MacGill (vicprezidanto) gvidas la subteamon "Movada Evoluo": Kapablaga agado (ILEI, edukado.net, aktivula trejnado), Komisionoj pri Oceanio kaj Afriko;

José Antonio Vergara, subteamo "Konsciigo": Tutmonda Inform-Reto (TIR); Faka agado, Terminologia Esperanto-Centro (TEC), IKU; TEJO kaj CED (kunlabore kun Fettes);

Stefano Keller gvidas la subteamon "Monda Evoluo": Konsciigo: Komisiono pri Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj (KRIO), Ĝemelaj urboj;

Barbara Pietrzak: Kultura evoluigo (i.a. Akademioj Lingva kaj Literatura, Belartaj Konkursoj), Komisionoj pri Eŭropo kaj Mezoriento/Nord-Afriko;

Lee Jung-kee: Kapabligo (kunlabore

kun MacGill), Novaj landaj asocioj, Komisiono pri Azia Esperanto-movado, E-Centroj.



Foto Petr Baláž

Konsilio

La Komitato aprobis la starigon de Konsilio kaj regularon, kiu difinas ĝian rolon jene:

La Konsilio enhavos homojn, kiuj povas kontribui al la evoluigo de la ĉefaj agadkampoj de la Asocio: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo. Ĝi estos gvidata de la Ĝenerala Sekretario de UEA, kadre de la Estrara subteamo pri "mastruma evoluo", kiu inkluzivas la Prezidanton kaj la Vicprezidanton.

Post diskuto la sekvaj konsilianoj estis akceptitaj: Petro Baláž (Slovakio), Heidi Goes (Belgio), Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio), Johannes Mueller (Germanio), Zsófia Kóródy (Germanio), Mélanie Maradan (Svislando), Francesco Maurelli (Italio), Veronika Poór (Hungario), Orlando Raola (Usono), James Resende Piton (Brazilo), Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo), Amri Wandel (Israelo), István Ertl (Luksemburgo) kaj Michela Lipari (Italio).

Strategiaj Prioritatoj de UEA 2013-2017

Agadkampo 1: Konsciigo

1.1. **Modernigi kaj kompletigi la publikan bildon pri Esperanto.** Atingi, ke Esperanto estu vaste komprenata kiel moderna, vivanta lingvo kun unika historio kaj dinamika kulturo.

1.2. **Varbi kaj prizorgi subtenantojn kaj kunagantojn.** Atingi, ke la socia valoro de Esperanto kaj UEA estu vaste rekonata, tiel ke multaj kiuj ne mem uzas Esperanton, tamen morale kaj finance subtenu ĝin aŭ kunlaboru kun Esperanto-organizoj por komunaj celoj.

1.3. **Varbi, interligi kaj trejni aktivulojn.** Disvolvi mondvastan reton de multaj registritaj kaj lertaj aktivuloj pri informado, eksteraj rilatoj, kaj esploro kaj dokumentado.

Agadkampo 2: Kapabligo

2.1. **Kursoj kaj ekzamenoj.** Plimultigi la nombron de tiuj, kiuj sukcese trapasis registritan kurson kaj internacian ekzamenon pri Esperanto, i.a. por pli fidinde pritaksi, kiom la lingvo disvastiĝas ĉiujare.

2.2. **Trejnado de gvidaj aktivuloj.** Starigi programojn por la trejnado de movadaj organizantoj (de projektoj, renkontiĝoj kaj kongresoj, asocia administrado kaj financo, monvarbado k.s.), instruistoj, tekstumantoj (prizorgantoj de retpaĝoj, revuoj k.s.), tradukantoj, terminologoj kaj informadaktivuloj.

2.3. **Esperanto kiel eduka movado.** Kunlabori kun organizoj sur ĉiuj niveloj de la movado por doni al instruado, trejnado kaj tutmondeca edukado pli altan prioritaton en la planado, komunikado kaj agado.

Agadkampo 3: Komunumo

3.1. **Plivastigi kaj disvolvi la uzadon de la servoj de UEA.** Temas ne nur pri pligrandigo de la nombroj de uzantoj, sed ankaŭ pri pliprofundigo de la uzanto-sperto.

3.2. **Fari pli facila, alloga kaj kontentiga la partoprenon en konkretaj kulturaj kaj fakaj agadoj.** Per tia partopreno oni firmigas senton de aparteno al la movado (kaj al UEA), kaj krome pludisvolvas la proprajn lingvajn kapablojn kaj kulturan kleron.

3.3. **Disvolvi la solidaran helpagadon.** Multaj homoj donacas al la fondaĵoj de UEA, iuj kluboj kaj asocioj entreprenas proprajn solidarajn agadojn, kaj diversaj individuoj helpas aliajn individuojn, klubojn, projektojn ktp. La kampon eblas multe plifortigi per bona komunikado pri bezonoj, subten-ebloj, rezultoj kaj simile.

Agadkampo 4: Kunordigo

4.1. **Evoluigi pli aktivan kaj koheran organizan kernon.** Krei pli grandan kernan organizan teamon kiu laboras sub komuna strategio, komunikas intense kaj efike inter si kaj interkonsile prizorgas la ĉefajn agadkampojn.

4.2. **Restrukturi kaj plivigli la rilatojn kun la diversaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj landaj asocioj.** Necesas reformi la sistemon por pli bone kombini la fortojn de la diversaj asocioj kaj disvolvi kulturon de kunlaboro kaj kunplanado.

4.3. **Plisaniigi kaj plivastigi la financojn per kreskigo de rimedoj kaj pliefikigo de servoj.** Necesas provi plibonigi ambaŭ flankojn de la spezokonto – malaltigi la kostojn kaj altigi la rimedojn.

NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA

En sia unua kunsido en Rejkjaviko, la 20-an de julio 2013, la Komitato de UEA elektis tri novajn Honorajn Membrojn de UEA.

ROLAND LINDBLOM (Svedio) naskiĝis 1931-01-19. Eklernis Esperanton 16-jara kaj jam post ses monatoj gvidis kurson. En 1950 li fariĝis prezidanto de la distrikto de Sveda Esperanto-Federacio en Okcidenta Svedio. En 1958 li kunfondis Svedan Esperantistan Junularan Unuiĝon kaj iĝis ĝia vicprezidanto. En 1974 li fariĝis vicestrarano, en 1976 estrarano kaj en 1978 prezidanto de SEF, kiun taskon li plenumis ĝis 1985. Membriĝis en UEA en 1953, fariĝis vicdelegito en 1957 kaj delegito en 1970. Komitatano de UEA 1978-1986, 1992-2001 kaj 2007-2010, estrarano 1983-1986 kaj kunordiganto de la Elekta Komisiono 1999-2002. Li estis prezidanto de LKK de la 65-a en Stokholmo 1980 kaj de la 88-a en Gotenburgo 2003. La Alta Protektanto de la 65-a UK estis la parlamentestro Ingemund Bengtsson, kiun li persone konis kaj kies apogon al Esperanto li povis utiligi diversokaze. Lindblom reprezentis UEA en du Unesko-konferencoj en Stokholmo: en 1978 pri informado kaj en 1998 pri kulturo. En 1998 li reprezentis UEA ĉe konferenco de ISO en Stokholmo.

BIRUTA ROZENFELDE (Latvio) Naskiĝis 1933-12-18. La periodon de 1949 ĝis 1956 ŝi pasigis en la Amura regiono de Sovetio, kien ŝia familio estis deportita. Ŝia esperantista patro ekinteresis la filinon pri la lingvo. Reveninte al Latvio en 1956 Rozenfelde studis en la

Riga Pedagogia Instituto, kie ŝi partoprenis ankaŭ Esperanto-kurson kaj tuj ekaktivis en la movado. En 1959 ŝi organizis la unuan Baltian Esperanto-Tendaron (BET) apud Rigo. La tradicio de BET (nun Baltiaj Esperanto-Tagoj), alterne en la tri baltaj ŝtatoj, daŭras; en 2014 okazos en Latvio jam la 50-a BET. Rozenfelde aktive partoprenas en ilia organizado. En 1993 ŝi prelegis kaj koncertis en Finnlando. Ŝi partoprenis en multaj UK-oj kaj estis komitatano A de UEA 1995-2010. Ekde 1993 ŝi estas fakdelegito pri kulturo. Ŝi estas vicprezidanto de Latvia Esperanto-Asocio kaj gvidas Esperanto-klubon ĉe la Latva Societo de Rigo.

HALLGRÍMUR SÆMUNDSSON (Islando) naskiĝis 1926-06-19, esperantistiĝis en 1947. En UEA ekde 1948 kaj estis jardekojn la plej agema movadano en Islando por la Rejkjavika Esperanto-societo "Aŭroro" kaj por Islanda Esperanto-Asocio, kaj gvidis kursojn. Dum multaj jaroj li provlegis la revuon *La Tradukisto*, por kiu li tradukis novelojn el Esperanto en la islandan kaj inverse. Li esperantigis la klasikan islandan infanlibron *Blondulo* (2007) kaj tradukis el Esperanto en la islandan la infanlibron *La varma rivereto* de E. Starovasnik. Komitatano A de UEA 1980-1986 kaj poste observanto ĝis 2001, delegito 1949-1960 kaj ekde 1977. Ĉefa fondinto de la libroservo kaj biblioteko de Aŭroro kaj longe prezidanto de Aŭroro kaj de IEA. Kiel sekretario de LKK de la 62-a UK en Rejkjaviko 1977 li decide kontribuis al tio, ke tiu UK estis titolita "perlo en la kongresa koliero". La sorto ne permesis al li vidi la UK-on por la dua fojo en Islando, ĉar post elĉerpa malsano li forpasis la 22-an de junio.

REZOLUCIO DE LA 98-A UK

1034 partoprenantoj en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 55 landoj de ĉiuj mondopartoj al la plej norda ĉefurbo, Rejkjaviko, sur la insulo Islando,

Diskutinte en pluraj sesioj pri la temo *Insuloj sen izoliĝo: por pli justa komunikado inter lingvo-komunumoj;*

Konstatas, ke insuloj – historiaj, geografiaj kaj sociaj – estas originaj fontoj de biologia kaj kultura diverseco, kiujn indas konservi kaj protekti;

Esprimas maltrankvilon pri la nuntempe akriĝantaj minacoj al tiu diverseco, pro pluraj homogenigaj kaj detruaj tendencoj de la regantaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj tutmonde;

Samtempe bonvenigas la kreskantajn ŝancojn por translima kaj transkultura interkompreniĝo, kiujn donas la disvastiĝo de komunikaj rimedoj kiel Interreto;

Atentigas pri la graveco de lingva diverseco kaj lingva justeco en la protektado de tiu kultura bunteco, kiun heredigis al ni la insuloj de la mondo;

Memorigas, ke ĝuste tiu protektado de diverseco estas kerna valoro de la movado por la internacia lingvo Esperanto;

Konfirmas la volon de la Esperantomovado kunlabori cele al mondo de "insuloj sen izoliĝo", kie ĉiuj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti kaj plue disflori en reciproka respekto;

Alvokas al mondvasta kunlaboro per lingve justaj rimedoj por kontraŭstari la

minacojn de klimatsanĝo kaj biokultura homogeniĝo;

Asertas la urĝecon de tia agado por konservi la trezorojn de nia insuleca planedo.

Rejkjaviko 27 julio 2013

Rezultoj de la Belartaj konkursoj 2013

Poezio:

Unua premio: Nicola Ruggiero pro *Okazis iam*;
Dua premio: Benoît Philippe pro *Atena taverno*;
Tria premio: Nicola Ruggiero pro *Nur korvoĵdu*.

Partoprenis 32 verkoj de 17 aŭtoroj el 15 landoj.

Prozo:

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: Ewa Grochowska pro *Parentezo*;
Tria premio: Jesper Jacobsen pro *La punĉbovlo de la diablo*;
Honora mencio: Ewa Grochowska pro *Eskapo*.
Partoprenis 24 verkoj de 12 aŭtoroj el 10 landoj.

Teatraĵo:

Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: ne aljuĝita;
Tria premio: Luiza Carol pro *Tempo rabita*;
Honora mencio: Nikolao Uzunov pro *Veronia*.
Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

Eseo:

Premio "Luigi Minnaja": Jorge Camacho Cordón pro *De hajko al hajko*, kaj Lena Karpunina pro *Aliro al la mistera Jean Ribillard*;
Dua premio: ne aljuĝita;
Tria premio: Dimitrije Janicic pro *Cent jaroj de originala Esperanto-literaturo en Serbio*.
Partoprenis 8 verkoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj.

Infanlibro de la Jaro:

Eldonejo Mondial pro *La mirinda sorĉisto de Oz* (traduko: Donald Broadribb).
Partoprenis 1 verko de 1 eldonejo el 1 lando.

R.U.R.

Humphrey Tonkin

La dramo R.U.R., unue prezentita en la jaro 1921, estis eksterordinare influa ne nur pro sia enhavo sed ankaŭ pro sia stilo.



Ĝi reprezentis samtempe esploron de la futurismo kaj kritikon de tiu sama skolo, kiu glorigis la forton kaj rapidecon de maŝinoj kaj prognozis pli bonan estontecon por la homaro pro ilia kapablo redukti kostojn per amasa produkto.

En sia dramo la ĉeĥa aŭtoro Karel Čapek unuafoje uzis en literatura verko la nocion de “roboto” – home fabrikita maŝino kun multaj atributoj de homoj, kiu rolu kvazaŭ sklavo aŭ servisto de la homo. Sed la robotoj de R.U.R. tiel proksime similas homojn, ke ili fine ribelas, detruante la homojn mem. En la fino de la dramo du robotoj enamiĝas, kaj sekve komencas kultivi la ecojn de la homa spirito – do komencas fariĝi plene homaj. Tiel la homa specio renaskiĝas en nova formo.

En la rejkvjavika kongreso la ĉeĥa ensemblo DoMa kuraĝe prezentis simpligitan kaj mallongigitan version de la teatraĵo. La grupo de aktoroj estis kunkolektita por tiu ĉi celo – parte el esperantistoj kaj parte el junaj aktoroj, kiuj lernis sufiĉan Esperanton por

parkeri siajn rolojn. Konsidere la cirkonstancojn kaj la esence improvizitan karakteron de la ensemblo konsisto, la rezulto estis vere impona. Ni esperu, ke la ensemblo daŭrigos sian laboron per pliaj verkoj kaj per plia polurado de tiu ĉi dramo.

La cirkonstancoj, en kiuj la aktoroj devis labori, estis en multaj rilatoj vera defio. La halo estis multe tro granda por tia teatraĵo, en kiu nepras ke la spektantaro ne nur vidu bone la rolulojn sed ankaŭ ligu ilian aktoradon al ilia elparolo (Esperanto ja ne estas la denaska lingvo de la spektantaro, kaj sekve oni devas dediĉi duoblan atenton al projekciado de la voĉoj kaj absolute klara elparolo – io apenaŭ ebla en tia kaverna spaco). Kial ne prezenti la teatraĵon kelkfoje dum la semajno en draste pli malgranda spaco, tiel ke oni sentu almenaŭ ian rilaton inter la aktoroj unuflanke kaj la spektantoj aliflanke – kaj tiel ke la aktoroj enhejmiĝu en la verko kaj plene ĝin ekspluatu?

La Esperanta teatro laboras sub malfacilaj cirkonstancoj en plej bona okazo. Kial ŝnurligi al ĝi la krurojn por kvazaŭ garantii stumblon?

Min mirigis la kapablo de la aktoroj superi ĉiujn obstaklojn ĵetitajn al ili survoje; sed ili ne devu labori en tiaj kondiĉoj.

El la revuo Esperanto 9/2013.



Rim. de red.:

Aktora debuto de Petro Chrdle – unuafoje sur la scenejo kaj tuj antaŭ mil spektantoj el 55 landoj - pri tiu kuriozaĵo raportis ankaŭ ĵurnalo en Dobřichovice, kie Petro vivas.

Kontribuo de ĉeĥaj esperantistoj al la 98-a UK

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 20-a ĝis la 27-a de julio kaj ĝin partoprenis 1034 personoj el 55 landoj. Inter ili estis estis 27 ĉeĥaj ĉeestantoj, kiuj estis bone videblaj.

Sendube la plej grandan pozitivan impreson postlasis la teatra grupo DOMA kompletigita de du esperantistoj Jan Fidel Řepa kaj Petr Chrdle. Ĝi prezentis teatraĵon bazitan sur la dramo de Karel Čapek R.U.R. La eĥo estis tre pozitiva. Mi demandis neniun, ĉar tiukaze la laŭdo povus esti nur pro dececo. Tamen, multaj famaj esperantistoj venis al mi gratuli kaj esprimi laŭdon al la tuta ensemblo kaj admiro al la ĝia gvidantino. La teatraĵo estis prezentita unuan fojon dum Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy, kie okazos la (almenaŭ provizora) lasta prezento la 27-an de septembro 2013 ene de la solenaĵo omaĝe de du jubileoj: 80 jaroj de la loka Esperanto-Klubo kaj 5 jaroj de Esperanto-muzeo. Ĉiuj do havas ankoraŭ ŝancon sperti tiun unikan kulturan travivaĵon en Esperanto.



Sed la ĉeĥaj esperantistoj estis ne-pretervideblaj ankaŭ aliloke kaj alitempe. Dum la komitatkunsidoj Ĉeĥan Esperanto-Asocion reprezentis la nova A-komitatano Miloš Bloudek. Li ankaŭ transprenis por ĈEA el la manoj de la UEA-estraranino Barbara Pietrzak Premion Cigno por la jaro 2012. Ene de la solena inaŭguro salutis nome de la ĉeĥaj esperantistoj Pavel Brom. Věra Barandovská prezentis prelegon „Insulo Thule vera kaj fikcia“ dum la Internacia Kongresa Universitato kaj prezentis trifoje la festlibron honore al okdekjariĝo de sia edzo prof. Helmar Frank, kiun ŝi redaktis: unue dum la Movada Foiro, en kiu ŝi reprezentis AIS San Marino, duan fojon dum la programero „Libroj de la jaro“ kune kun la eldonisto Petro Chrdle kaj memstare dum la „Aŭtora duonhoro“ en la libroservo. Simile Petro Chrdle prezentis la trian eldonon de sia verko „Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj“ eĉ kvarfoje, memstare en sia aŭtora duonhoro, krome kun aliaj novaĵoj de KAVA-PECH dum la Movada Foiro, ene de la kunveno de IKEF kaj kune kun la ceteraj novaĵoj de KAVA-PECH ene de la programero „Libroj de la jaro“.

Movadan Foiron partoprenis ankaŭ Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Muzeo Svitavy en komuna giĉeto prizorgata de geedzoj Bloudek.

Ĉiuj partoprenantoj certe trovis la vojaĝon al la kongreso tre interesa. Kaj la riĉa programo, kaj la tre interesaj ekskursoj en unika islanda naturo devis postlasi fortan impreson en ĉiuj. Sed okazis ankaŭ malagrablajoj, kiuj feliĉe ĉiuj havis bonan finon. Tuj en la flugmaŝino kolapsis Fidel (Jan Ĥepa), kio kaŭzis zorgojn kaj pri lia sano, kaj pri la sorto de la teatraĵo. Sed laŭ liaj vortoj oni bone „riparis“ lin en la mal-sanulejo kaj efektive li revenis bonhumora kiel ĉiam kaj dum la prezentado tute ne estis videbla ajna lia sana malhelpo. En tiu loko mi volas ankaŭ esprimi dankon al Stano Marĉek, kiu nur surloke ricevis la tekstojn kaj rapide lernis la rolon de Fidel (Karel Ĉapek) por povi anstataŭigi lin se li ne povus ludi.

Eble menciindas ankaŭ livero de pakaĵo al kelkaj partoprenantoj flanke de flugkompanio kun kelktaga prokrasto, malvarmumo de Josef Trojan, unu el tiuj trafitoj, kiu tamen trovis perfektan prizorgantaron en Margit Turková kaj baldaŭ povis partopreni la kongresumadon inkluzive de ekskursoj. Alia bedaŭrinda afero estis, ke pro malmulte da spaco en la libroservo ne estis elpakitaj ĉiuj skatoloj kaj inter tiuj, kiuj restis enpakitaj dum la tuta kongreso estis ambaŭ menciitaj verkoj, Festlibro por prof. Frank kaj Profesia uzo de Esperanto. Ni vane devis klarigi al la interesigantoj, ke ne estas nia kulpo, ke ili ne povas la prezentatajn librojn aĉeti.

Petro Ĥrdle

Salutmesaĝoj

La islanda ŝtata prezidento **Ólafur Ragnar Grímsson**: „*Dum la nova jarcento la teknologio malfermis multajn dimensiojn en la mondo, translime konektis homojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj favoris la ŝanĝiĝojn en la mondo, inter kiuj la lukton por progresigi Esperanton.*“

L. C. Zaleski-Zamenhof: „*Alveninte al Rejkjaviko el proksimaj kaj malproksimaj kontinentoj aŭ el aliaj insuloj, laŭ maro aŭ tra aero, vi ne plu sentis, ke insulo signifus izolecon. Ĝuste, la maro ne plu dividas, sed ligas insulojn inter si, kaj ligas ilin al kontinentoj; transportoj plej ampleksaj pli facile trafluas marojn ol vojaĝus laŭ tero.*“

Probal Dasgupta: „*Tamen, ĉu ne eĉ pli glorie ni atingos niajn celojn, se ni lernos de Islando la arton pli integre celi? Ĉi tie naskiĝis la sagaoj; sur ĉi tiu insulo restas forta la poezio; ankaŭ nia Baldur Ragnarsson verkas kaj Esperante kaj islande. Ni demandu nin, kiel do la malgranda islandanaro, eĉ tra malbona vetero ekonomika, sukcesadas konservi lingvan gloron, kaj starigi modelon de venko interna.*“

Islando scipovas poezii – scipovas konservi vivipovan paralelecon inter versoj. Ĉiu verso hisas standardon de sendependado. Tamen inter la versaj insuloj fluas konekta maro de ritmoj, kiuj interagordas la versojn. Ni ĉiuj lernu de Islando, kiamaniere kunmeti agordojn sen forofero de la virta memstareco. Alie dirite, ĉi-kongrese reflamu nia interna ideo.“

(Fragmentoj el la paroladoj)
(laŭ Gazetaraj Informoj de UEA)

Premioj de UK 2013

■ **Trofeo Fyne:** En la Fermo de la 98-a Universala Kongreso la 27-an de julio en Rejkjaviko estis anoncita la decido de la antaŭa Estraro de UEA pri la aljuĝo de Trofeo Fyne al **Vjetnama Esperanto-Asocio** pro la plej granda procenta kresko de la nombro de individuaj membroj de UEA.

■ **Premio Deguĉi:** Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2013 estis aljuĝita al la reta projekto *lernu.net*. La retejo lernu.net estis lanĉita en decembro 2002. Ekde tiam amaso da homoj lernis Esperanton per la modernaj retaj rimedoj, kiujn ĝi ofertas. Jam preskaŭ 150 000 homoj ĉie en la mondo estas registritaj kiel ĝiaj uzantoj.

■ **Diplomo pri Elstara Agado:** *Grietje Buttinger* (Britio) pro gastigado de esperantistoj dum pluraj jardekoj; *Kostas Kiriakos* (Grekio) pro lia ampleksa libro en la greka pri Esperanto, aperinta okaze de la 125-jariĝo de la lingvo; *Zsófia Kóródy* (Germanio) pro instrua agado kadre de ILEI, KER-ekzamenoj kaj la Interkultura Centro Herzberg; *Hans Michael Maitzen* (Aŭstrio) pro reprezentado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno; *Mélanie Maradan* (Svislando) pro agado ĉe internaciaj terminologiaj instancoj kiel reprezentanto de UEA; *Arikapalli Giridhar Rao* (Hinda Unio) pro multflanka Esperanto-agado en la faka, instrua-ekzamena kaj organiza kampoj; *Roland Rotsaert* (Belgio) pro okupiĝo pri la Esperanto-biblioteko en la flandra urbo Kortrejko; kaj *Bardhyl Selimi* (Albanio) pro lia rolo en la plifortigo de la albana Esperanto-movado.

■ **Diplomo pri Elstara Arta Agado:** *Gerrit Berveling* (Nederlando) pro kontribuo al la traduka Esperanto-literaturo; *Jorge Camacho* (Hispanio) pro kontribuo al la originala Esperanto-literaturo; *Georgo Handzlik* (Pollando) pro kontribuo al la Esperanto-muziko kaj eldona agado; kaj *Mao Zifu* (Ĉinio) pro kontribuo al la originala Esperanto-poezio.

■ **Siru Laine** el Finnlando fariĝis la dua ricevanto de la Premio Diana Aitai, kiun UEA starigis per donaco de la estona esperantisto Peeter Aitai omaĝe al la memoro de lia filino Diana, kiu forpasis nur 22-jara en tragika akcidento. La premio celas rekoni kaj kuraĝigi la plej junan aktivan anon de la Internacia Koruso de Universala Kongreso laŭ la rekomendo de ĝia direktoro, ĉi-foje Alan Bishop el Aŭstralio. Diana Aitai mem estis korusano en la UK-oj de Roterdamo (2008) kaj Bjalistoko (2009).

Siru Laine, kiu studis en Islando, ne nur kantis en la Internacia Koruso, sed ŝi krome estis membro de la Loka Kongresa Komitato kaj helpis kiel interpretisto kaj ĉiĉerono.

■ KONRAD ANDRZEJUK VENKIS EN LA ORATORA KONKURSO

En la Oratora Konkursito de la 98-a UK en Rejkjaviko kuraĝe partoprenis tri gejunuloj el tri landoj: Japanio, Koreio kaj Pollando. Venkis Konrad Andrzejuk el la Bjalistoko, kiu elektis kiel la temon de sia parolado la kongresan temon *Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj*. La juna oratoro el la Zamenhof-urbo estis premiita per libroj.

KELI kongreso 2013 en Svitavy



Jam la 63-an fojon kongresis KELI-anoj. La gefratoj el dek nacioj kunvenis en la urbo Svitavy, la urbo de Esperantomuzeo. La vetero en la tagoj de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto estis bela, eĉ se tro varma, tamen la etoso estis eminenta.



Kune ni interkomunikis la spertojn pri AKVO, la ĉefa temo de la kongreso. Akvo, fonto de la vivo, akvo, kiu scipovas kaj malhelpi kaj mortigi, akvo, per kiu ni en la kredo eniras la novan vivovojon. Dum la ekskursoj ni ĉeĥoj povis fieri pri la beleco de la regiono. Pri belaj urboj Svitavy, Poliĉka kaj Litomyšl kaj iliaj historio. Nature, ke atentemon kaptis ĉefe komponistoj Bohuslav Martinů kaj Bedřich Smetana.



Por la venonta jaro ni esperas ekumenan kongreson de KELI kaj IKUE en norda Italio, en urbo Trento. La kongreson preparos IKUE-anoj, kaj por la plua jaro KELI-anoj rekompencos inviton al la ekumena kongreso en Strasburgo.



La kongresojn povas partopreni eĉ neanoj de KELI kaj IKUE. Eĉ ne eklezianoj. Eble por ekkoni, kial la kredantoj kredas estante alimaniere ordinaraj homoj. Venu ekumeni kun ni. Adresojn vi trovos sur la retpaĝoj de IKUE kaj KELI.

Václav Pospíšil



SAT-kongreso en Madrido

Iom pli ol 100 membroj kaj nemembroj de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) partoprenis ĝian 86-an Kongreson en Madrido, kiu okazis de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2013 sub la devizo "Esperanto: taŭga ilo por sociaj luktoj".

Aparte riĉa estis la kultura flanko de la kongreso. Koncertis Jomo dum tuta vespero, kantis parto de la koruso Interkant', gvidata de Franjo Leveque, kaj unu el la altaj punktoj estis la apero de la indignula koruso Solfónica, kies scenejo estas plej ofte la stratoj kaj placoj. Miguel Fernández deklamis el sia nova libro Poezio: armilo ŝargita per futuro, kolekto de socie engaĝita, revolucia poezio ĵus eldonita de SATeH.

SAT diskutis ankaŭ pri liberigo de la tuta PIV en la reto. Fakte ĝi tie jam estas, sed nur por tiuj, kiuj registriĝis ĉe Lernu.

Filmetojn pri la kongreso oni povas trovi ĉe Youtube, sufiĉas enskribi „86a SAT-Kongreso”.

Laŭ Libera Folio

NOVA estraro de TEJO

La komitato de TEJO dum la IJK en Israelo elektis novan estraron – kun malnovaj prezidanto, ĝenerala sekretario kaj kasisto. Novaj estraranoj iĝis Veronika Poór kaj Alexandre Raymond. La estraron forlasis Sergio Tyrin, kiu ne rekandidatiĝis, kaj Petra Smidéliusz, kiu ne estis reelektita de la komitato.

Laŭ Libera Folio

Konferenco ĈES

25-28. ĥijna 2013

Konferenco zŭstává v původním termínu, přestože jsou volby, protože nasmlouvané podmínky nelze měnit. Voliĉi si mohou zaříditi **voliĉské průkazy** nebo odvoliti těsně před odjezdem v pátek od 14 hod.

Přihláška byla zveřejněna v minulém čísle Starta a je k dispozici i v elektronické podobě na adrese:

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/konference-ceskeho-esperantskeho-svazu-560.html>

Místem konání konference je Nymburk, Domov mládeže SOŠ a SOU, V Kolonii 1804. Je to blízko autobusového i vlakového nádraží. Ubytování v dvoulůžkových, v případě zájmu třílůžkových pokojích (buňkový systém, WC a sprcha společné pro dva pokoje).

Zvýhodněný balíček (3 noclehy od pátku do pondělí (= státní svátek) + plná penze + úč. poplatek za program – bez výletu do Loučně) **1.350,- Kč**. Fakultativní autobusový výlet na zámek Loučeň (27.10.) 220,- Kč, s labyrintáři 270,- Kč (*senioři a studenti díky slevě o 50,- Kč méně*).

Na programu bude také promítání o Reykjavíku, prohlídka města, vzdělávací a diskusní programy, taneční večer, výlety, pracovní skupiny. Odjezd v pondělí (státní svátek).

90 jaroj de EK Přerov

Okaze de la 90-jariĝo de la klubo en Přerov estis aranĝita konkurso de infandeseĝoj kun la temoj „Kio estas feliĉo“ kaj „Birdaro de nia planedo“ kaj antaŭ la solenaĵo la 2-an de septembro 2013 estis inaŭgurita ekspozicio de la desegnoj en la pasejo Pasáž.



Al la solenaĵo mem la 7-an de septembro en la salono de la bierfareja restoracio venis preskaŭ kvindeko da personoj.



La prezidanto de la klubo Antonín Krejčíř alparolis la ĉeestantojn per konciza priskribo de la kluba historio.

La unuaj mencioj pri la kursoj en Přerov aperis jam en 1912, sed nur en 1923 oni sukcesis fondi oficiale la klubon. En 1927 estis elektita kiel honora prezidanto instruisto Josef Krumpholtz (kiu havas en la urba muzeo de Komenio propran ekspozicion kiel meritplena pedagogo).

Multaj dokumentoj perdiĝis dum la dua mondmilito, post la milito la klubo restariĝis sub protekto de fervojistoj. Post nuligo de la tutlanda asocio en 1952 la klubo laboris plu ĉe bierfarejo. Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto la klubanoj plantis cent arbidojn (piceojn). En 1997 trafis la klubejon inundoj, kiuj difektis multajn librojn kaj dokumentojn, sed saviĝis la kluba kroniko.

La detalan historion de la klubo priskribas 56-paĝa broŝuro, kiun ĉiu ĉeestanto ricevis. En libroservo oni povis preni ankaŭ brokantaĵojn (laŭplaĉe, pago libervola).



Miroslav Malovec tralegis komunan saluton de Vladimír Dvořák (asocia prezidanto) kaj Pavla Dvořáková (komisiito pri kluboj), li mem salutis en la nomo de EK Brno. Libuše Dvořáková gratulis en la nomo de Esperanto-muzeo kaj klubo de Svitavy. Ankaŭ reprezentantoj de aliaj kluboj esprimis sian bondeziron kaj post siaj alparoloj ricevis donace tekono kun materialoj. A. Krejčíř tralegis ankaŭ salutojn, kiuj venis poŝte aŭ ret-poŝte.



Jan Werner salutis en la nomo de Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno anstataŭ la malsaniĝinta prezidantino Věra Podhradská kaj samtempe rememoris preskaŭ forgesitan datrevenon. La 6-an de septembro 1952 la tiamasocio de Esperantistoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko kunvokis kunvenon de reprezentantoj de ĉiuj kluboj por trakti pri la likvido de la asocio. Komunistoj postulis, ke esperantistoj likvidu sin mem. La traktado daŭris tutajn tagojn kaj nokton kaj matene la 7-an de septembro 1952 oni voĉdonis: 23 voĉoj por la likvido, 15 homoj sindetenis, nur tri estis kontraŭ (František Burda, la du aliaj estas nekonataj).

Kompreneble, la klubo ne povis ne rememori la forpasintan honoran prezidanton de la klubo Ludvík Chytil, kiun ĉiuj omaĝis per minuto da silento. Li meritas pri la bonaj kontaktoj de la klubo kun la magistrato, kiu lin plurfoje honoris. Ĉeestis ankaŭ lia filo kun familio.



S-ano Šváček projekciis filmon pri la infanaj desegnoj, poste ĉiuj transiris en la korton por komuna fotado. Antaŭ la tagmanĝo oni ankoraŭ transdonis diplomojn al infanoj, kiuj venkis en la konkurso de desegnoj.

Posttagmeze parto de la ĉeestantoj iris rigardi la ekspozicion kaj kelkajn lokajn vidindaĵojn, aliaj restis en la salono por rigardi filmetojn pri esperantistaj aranĝoj.

Lastajn du horojn koncertis Jan Duda (violono) kaj Václav Nosek (akordeono). La programon fermis Květa Černá, reĝisorino de la soleno.



*Teksto Miroslav Malovec
Fotoj L. Dvořáková, O. A. Fischer*

Busvojaĝe al Esperanto-urbo en Germanio

Fine de junio forveturis kvardek tri esperantistoj el la tuta Ĉeĥa respubliko, membroj de AEH (Asocio de Esperantistoj Handikapuloj), per buso el Pardubice al la urbo de Esperanto Herzberg am Harz. Ĝi kuŝas en centra-germana montaro Harz.



Survoje al Herzberg ni haltis por kelkaj horoj en Leipzig kaj iomete promenadis tra alta urbo, kompreneble ni ankaŭ vidis la faman monumenton de la Batalo de nacioj.

En Herzberg ni estis tre afable bonvenigitaj kiel de s-ino Teresa – hotel-estrino, kiu parolis Esperante, tiel de la gvidantoj de Interkultura Centro Herzberg Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy. Kaj tiel ni ĉe ilia akompano ekkonis multajn interesaĵojn; monumenton de L. L. Zamenhof, apude starantan la plej malnovan tre interesan akvoelektrejon, monumenton de Joachim Giesner. Ni estis akceptitaj de la urbestro, kiu ankaŭ parolis Esperante. Ni vizitis kastelon, kiu staras super la urbo kaj tiean interesan ekspozicion de ŝtonoj el multaj landoj, kiun ni pliriĉigis per la ŝtono de monto

de Kunětice ĉe Pardubice. Ni aŭskultis rakontadon pri ilia agado, pri funkcioj de la Centro kaj ni vidis, ke per nia semajnfina ekskurso ni „engrimpis“ en la solan liberan tempon, ĉar ĉiuj ceteraj semajnfinoj estas plenaj de diversaj renkontiĝoj, seminarioj, lingvokursoj ktp.

Sabatan tagon ni planis promeni tra Harzmontaro kaj rigardi pluajn vidindaĵojn.

Bedaŭrinde en la tempo, kiam ni povis admiri la belegan montaron, falis nebulo kaj ne permesis al ni vidi pli ol grizan ĉirkaŭaĵon. Tamen la busvojaĝo tra la montaro estis interesa. Multaj ŝildoj kaj tabuloj surprizis nin en germana kaj Esperanta lingvoj.



Dimanĉe ĉe la revenvojo ni haltis en Dresden, kie atendis niaj AEH membroj – geedzoj Langer kaj ili gvidis malrapide irantan grupeton, dum Josef Hron gvidis ceterajn por trarigardi la plej interesajn vidindaĵojn.

Lacaj, tamen kontentaj ni alveturis hejmen. Ni akiris spertojn pri propagado de Esperanto.

*Jarmila Rýznarová
fotoj Josef Hron
Blanka Nohelová*

La reviziintoj de PIV konfuzis la nomon Vjetnamo

Onomastika temo

Pasintjare (2012), la 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Hanojo, en la ĉefurbo de... de...(?)

La tutan antaŭkongresan tempon mi legadis, ke la kongreso okazas en **VJETNAMIO**. Legante kaj aŭdante tiun nom-formon mi suferis, ĉar mi scias, ke etno de vjetnamoj ne ekzistas. En naciaj lingvoj kiel nomo por la lando ekzistas *Vjetnam* aŭ *Vietnam*, en la oficiala loka lingvo *Viêt-Nam*, do en ĉiuj ceteraj lingvoj de la mondo proksimume same.

La franca lingvistika spertulo kaj esperantologo André Cherpillod¹ prezentis la nomon de Vjetnamo en la lingvoj franca, angla, germana, hispana, rumana, itala, novgreka, pola, ĉeĥa, rusa, ukraina, belorusa, litova, hungara, finna, araba, hebrea, turka, persa, indonezia, mongola, ĉina kaj japana. En ĉiuj ĉi lingvoj la nomo respondas al la lando, ne signifas loĝanton. Same la vjetnama nomo **Viêt Nam** difinas la landon. Ĝi venas de **Viêt** (nomo de olima princlando sude de Ĉinio) kaj **nam** = **sudo**, ne sudano. La vjetnama vorto por vjetnamano estas: **Ngu-o-i Viêt Nam**.

Dum en ĉiuj lingvoj de la mondo Vjetnamo estas lando, **unusolaj esperantistoj** en kelkaj lastaj jaroj uzas la formon «vjetnam(o)» por loĝanto de la lando. Kvankam Zamenhof nomis la lingvon internacia, la reviziintoj de PIV, la nuna Akade-

mio de Esperanto kaj ankaŭ la funkciularo de UEA obstinas tiun esencan proprecon kaj agas kontraŭ-internacie. Kaj ne malmultaj ŝafoj imitas ilin.

Ĝis la apero de la Nova PIV en la jaro 2002, la afero estis traktata preskaŭ unuece. Mi legas en la Waringhien-a PIV el la jaro 1970: **Vjetnamo** – *lando de la hindoĉina duoninsulo, ampleksanta Tonkinon, Anamon kaj Koĉinĉinujon kaj nun dividita en Norda kaj Suda Vjetnamo*. **Vjetnamano** – *ano de unu el la ĉefgentoj, loĝanta en Vjetnamo*. Nu, tiu lasta mencio pri vjetnama ĉefgento estas malvero, al la gentoj de Vjetnamo mi revenos iom poste.

La pragaj aŭtoroj de la *Poŝatlaso de la mondo*, Josef Kavka kaj Tomáš Pumpr, elstaraj esperantologoj, por la koncerna lando uzis ankaŭ la internacian formon Vjetnamo. Same G. Waringhien, C. Butler, C. Minnaja, T. Sekelj, A. Albault k.a.

Estas ĝenerale konate, ke la origina esperanta sufikso -uj/ kaj la nun ofte uzata internacia sufikso -i/ aplikiĝas por esprimi landon, laŭ PIV 3 (1970) la sufikso -uj/ signifas „landon loĝantan de la popolo montrata de la radiko.“ Laŭ la Fundamento kaj PAG tiu „popolo“ estas prave konjektebla kiel etno (gento), laŭ kiu estas la lando nomata.

Sekvante la gentojn en Vjetnamo, mi ne trovas genton de vjetnamoj, iun komunumon laŭ tiu etna aparteneco. La majoritata vjetnama gento estas **vjetoj**. En Eŭropo ni vere konas nur la politikan „nacion“ de vjetnamanoj, sed reale decus etne distingi ilin.

¹ André Cherpillod: *Lingvaj Babilajoj*, eld. La Blanchetière, 2005; ISBN 2-906134-65-1.

La landnomo Vjetnamo signifas ion kiel „vjeta sudo“. Tiu esprimo mem aludas, ke ekzistas la etno de vjetoj. Vjetoj prezentas la frapantan pliparton de la loĝantoj de Vjetnamo, sed krom ili en tiu lando vivas 53 aliaj etnoj, ekzemple tajoj, muongoj, nungoj, hmongoj, zaoj, ĉamoj, dĵarajoj, edeoj, pathenoj ktp. Ili ĉiuj estas vjetnamanoj, sed ne vjetnamoj. Eblas eĉ diri, ke la pliparto el ili parencas kun la majoritataj vjetoj nemulte.

Ĉar mi traktas la sudazian teritorion, mi proponas konsciiĝi pri simila problemo ĉe la lando-ŝtato Birmo. Laŭ etna diverseco ĝi estas analoga al Vjetnamo. Ankaŭ tie loĝas dekoj da etnaj komunumoj, kies membroj estas birmanoj, sed ne birmoj. Tion PIV inkluzive de la Nova PIV respektas kaj por la lando prezentas la nomon Birmo. El ĝi por la loĝantoj de Birmo deriveblas la nomo birmano.

En la suda Azio ni restu kaj observu, kiel ni en Eŭropo nomas la loĝantojn en la Malaka Duon-insulo kaj sur la Sundaj Insuloj. Plej ofte ni nomas ilin malajoj, ĉar ni intermiksas malajojn kaj malajzianojn, kvankam inter la nomoj ekzistas principa diferenco. La nomo malajo indikas etnan apartenecon, dum malajziano estas ĉiu loĝanto de la Federacio Malajzio, konsistanta el malajaj ŝtatoj. Malajzianoj estas ne nur malajoj, sed ankaŭ membroj de tieaj komunumoj ĉina, tamila k.a.

Kial la reviziintoj de PIV motivis sian decidon pri «Vjetnamio» kaj la rifuzon de la akademia rekomendo pri Vjetnamo el la jaro 1992, estas

por mi mistero. La rekomendo de AdE el la jaro 2009 estas klarigebla per nesufiĉa lingvoscio kaj klareco de ties membroj kaj ankaŭ per ilia neadekvata memfido. La eksmembro de AdE, mem ekŝiĝinta el tiu establaĵo, priskribis ĝian post-Waringhien-an evoluetapon per la vortoj: *En la unua PIV, sub la klera gvidado de G. Waringhien, ĉiuj kvar radikoj (rim. de J.W.: Kore', Panĝab', Ukrain', Vjetnam')... havis difinon logikan kaj konforman al la spirito de Esperanto kaj al la ĝenerala sinteno de Zamenhof... Sed la dua PIV bedaŭrinde, tre bedaŭrinde, „reviziis“ ilin...*

Fine mi atentigas pri evento, nuntempe preskaŭ forgesita, ke Zamenhof komence, en la unua periodo de la movado, por landnomoj praktikis sole la sufikson -uj, eĉ en la kazoj nenaturaj. Ĝuste la deriva regulo respektanta konsekvencon, kio ekzistis pli frue, ĉu lando, ĉu la nomo de (ties) loĝantoj, ne estis de li sekvata. Li nenature uzadis la afikson -uj/ ankaŭ ĉe la landoj, kies nomo anticipis la nomon de loĝantoj, ekzemple: Amerikujo, Brazilujo, Palestinujo. En la jaro 1895 li mem konstatis, danke al siaj spertoj en korespondado, ke tiu sistemo estas **neinternacia**, artefarita. En Lingvaj Respondoj (1911) li sin esprimis: „Se mi dum longa tempo uzadis «Brazilujo», «Ĉilujo» ktp., mi konfesas nun, ke tio estis erara.“

Kaj jen, cent jarojn poste iuj novtempaj movadaj „elituloj“ revenis al la eraro kaj oficiale trudis ĝin al ni. Kaj multaj el „ni“ kiel ŝafoj ilin obeas, eĉ kontraŭ la internacia esenco de la lingvo internacia. Ĉu oni ne konas la anoncon de Zamenhof sur la kovrilo

de la Unua Libro: „**Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia.**“

Studinte ĉiujn atingeblajn fontojn pri la problemo de landnomoj en Esperanto, mi trovis la plej kontentigan solvon ĉe A. Cherpillod (referencita supre en la piednoto), en la kvar reguloj:

Landnomoj laŭ la reguloj de André Cherpillod

Por solvi la ĝustan formon de landnomo en Esperanto, André Cherpillod starigis la jenan sistemon de **kvar reguloj**, uzeblaj laŭ hierarkia ordo: oni apliku la duan **nur**, se la unua ne estas aplikebla, la trian **nur**, se la unua kaj dua ne estas aplikeblaj, kaj la kvaran **nur**, se la unuaj tri ne estas aplikeblaj:

Unua regulo: Fundamento. Se la koncernata radiko troviĝas en la Fundamento, oni uzu ĝin kun la senco, kiun ĝi havas en la Fundamento, sen plia diskuto.

Tio estas simpla apliko de la netuŝebleco de la Fundamento:

«*Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon.*» (Antaŭparolo, p. 43).

Dua regulo: ĝenerala uzado. Se la koncernata radiko estas de longe uzata de la esperantistaro kun unu konstanta signifo, oni uzu ĝin kun tiu sama signifo.

Tio estas simpla konstato de la fakto, ke lingvo (kiu ajn lingvo, ĉu etnolingvo, ĉu planlingvo) evoluas mem, ne obeante al arbitra decido de eminentulo(j).

«*La plej grava leĝdonanto estas uzado*» (L. L. Zamenhof, O.V., p. 573, *Lingvaj Respondoj*, p. 56). «*Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco*» (L. L. Zamenhof, *Lingvaj Respondoj*, p. 15).

Ekzemplo de apliko de tiu ĉi regulo estas la senco donita al la radikoj aŭstr', ĉin', japan', portugal', uzataj de ĉiam nur en la senco gentonoma.

Tria regulo: internacieco. Se la koncernata radiko estas uzata en la tuto, aŭ almenaŭ en la plimulto, de la grandaj kulturlingvoj de la mondo, oni uzu ĝin laŭ la formo kaj kun la signifo, kiujn ĝi havas en tiuj lingvoj.

Tio estas simpla apliko de la fakto, ke Esperanto estas **monda** lingvo, ne regiona lingvo, **internacia** lingvo, ne nacia lingvo. Konsekvence, ĝi ne povas obei al regiona aŭ nacia uzado, sed nur al **monda, internacia** uzado.

«*Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia.*» (Unua Libro, kovrilpaĝo).

«*La vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj, ... mi lasis tute sen ia ŝanĝo.*» (Unua Libro, *Fundamenta Krestomatio*, 18a eldono, p. 238).

Kvara regulo: etnolingva uzado. Se neniu el la tri ĉi-antaŭaj reguloj estas aplikebla (malofta kazo), oni konsideru la etnolingvan uzadon de la koncerna radiko.

* * *

Konkludo: Estas necese ignori kelkajn fuŝitajn formojn de landnomoj, kiujn al la movado trudas la reviziintoj de PIV, la nuntempa Akademio de Esperanto (per la rekomendo el aprilo 2009) kaj UEA, kaj sekvi la raciajn **ZAMENHOFAJN** kaj **INTERNACIE** bazitajn formojn laŭ André Cherpillod, kiu en „Lingvaj Babilajoj“ notis: „...la reguloj, kvankam redaktitaj de mi mem laŭ la formo, estas **CENTPROCENTE ZAMENHOFAJ** laŭ la enteno.

Jan Werner, Brno 2013-07-06

Por terminologoj

Wera Blanke: *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj.* Mondial, Nov-Jorko, 2013, 19,80 Eur, 318 p.

Wera Blanke (ĝis 1986 Wera Dehler) okupiĝas pri terminologia laboro en Esperanto jam tri jardekojn, dum kiuj ŝi verkis vicon da artikoloj pri la temo kaj kun sia edzo Detlev Blanke iniciatis estiĝon de TEC (Terminologia Esperanto-Centro).

En la libro ŝi prezentas 38 artikolojn ordigitajn laŭ ok temoj: *Faka apliko kaj terminologio, La terminologio-scienco kaj lingvonormigo: signifo kaj planlingvaj radikoj, Principoj de terminokreado, Survoje al Terminologia Esperanto-Centro, Provizora bilanco de TEC kaj iom da perspektivo, Praktikaj provoj, Publike paroli, Recenzoj.*

La leganto do povas konatiĝi kun terminologiaj principoj kaj kun provoj apliki ilin en Esperanto-movado, kvankam tiun laboron malhelpas ne malmultaj problemoj kaj obstakloj. Ankaŭ la klopodoj organizi la terminologiajn labo-

rojn laŭ modelo de ISO ne sukcesis aŭ sukcesis nur kelkprocente.

Nia movado ne disponas pri financaj rimedoj, kiujn havas por terminologia laboro aliaj lingvoj, la internaciaj kolektivoj prilaborantaj terminarojn estas parte avantaĝo kaj parte malavantaĝo, ĉar ĉiu alportas el sia gepatra lingvo aliajn kutimojn kaj vidpunktojn, tamen la laboro estas ebla, se ĝi adaptiĝos al la ekzistantaj kondiĉoj kaj evitos erarojn, kiujn faris la antaŭaj generacioj.

La libro omaĝas vivjubileon de la aŭtorino. -mm-

Festlibro por Helmar Frank

Sub la titolo *Littera Scripta Manet, serta in honorem Helmar Frank* aperas festlibro de elstara esperantisto, prezidanto de Internacia Akademio de Sciencoj San Marino, Helmar Frank, okaze de lia 80-jariĝo. Sume 57 kontribuantoj artikolis por la libro, redaktita de lia edzino Věra Barandovská-Frank. La libron kuneldonis Institut für Kybernetik Paderborn kaj KAVA-PECH en la nomo de libera konsorcio ligita al AIS, Akademia libro-servo. Prezo 980 Kč, por ĈEA-membroj 490 Kč.

La scienc-nivelaj artikoloj estas prezentitaj dulingve (la maldekstra kolumno en penslingvo de la aŭtoro, la dekstra en Esperanto) kaj okupiĝas pri temoj teĥnikaj, matematikaj, lingvistikaj, historiaj kaj beletraj. El ĉeĥaj aŭtoroj kontribuis Věra Barandovská-Frank, Petr Chrdle kaj Zdeněk Půlpán, el slovakaj Eva Poláková. El la ceteraj aŭtoroj estas nialande konataj ekz. Gerrit Berveling, Detlev Blanke, Probal Dasgupta, Sabine Fiedler, Reinhard Fössmeier, Ilona Koutny, Zlatko Tišljár. -mm-

KOMENIUS - ZAMENHOF

La Vojo al Harmonio

Jaroslav Karhan (daŭrigo)

Tiucele necesas precipe ankaŭ unu komuna lingvo, kiun povus **ĉiuj** homoj facile ellerni kaj uzadi por reciproka interkompreniĝado ĉie, kie la lingvo gepatra ne sufiĉas. Li konvinkiĝis, ke tiun ĉi funkcion ne povas plenumi lingvo morta, kiel ekz. latino, kiu origine ŝajnis al li – pro sia neŭtraleco – kvazaŭ antaŭdestinita por tiu ĉi tasko. Sed ankaŭ lingvo de iu vivanta nacio ne povas esti ĝenerale akceptita por fariĝi ligilo de grandaj kaj malgrandaj nacioj.

Tial necesas lingvo nova, arte kreita kaj al neniun apartenanta. Tia lingvo neniun plialtigos, sed ankaŭ neniun humiligos. Ĝi devos esti facile ellernebla por ĉiuj homoj kaj fariĝi iu «latino de demokratio».

La juna studento ne nur meditis pri tiu ĉi afero, sed tuj eklaboris por efektiviĝi ĝin. Li ne volis konstrui novan lingvon pro scienca intereso. Nur sopiro kontribui al tuthomara interkompreniĝo kaj harmonio instigis lin al tiu ĉi granda laboro.

Jam kiel 19-jara studento li kompilis la unuan koncepton de sia lingvo kaj nomis ĝin «Lingwe uniwersala». Eta kajereto – tio estis rezulto de longdaŭra, laciga laboro. Naskiĝon de la nova lingvo li festis en sia studenta ĉambreto, la 5.12.1878, kun siaj kunlernantoj.

Rondo de junaj entuziasmoj, plenaj de idealoj kaj arda deziro plibonigi la mondon, kantis en la nova lingvo eĉ himnon pri frateco de ĉiuj homoj, kies komencaj vortoj sonis: «Malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam tempo estas. La

tuta homaro en unu familion unuigi devas!»

En junio 1879 Zamenhof finis siajn gimnaziajn studojn kaj liaj kunlernantoj disiris en plej diversajn lokojn. Iuj strebis la Zamenhofan lingvon disvastigadi, sed grandparte ili renkontiĝadis kun malakcepto, eĉ moko. Tial ili baldaŭ ĉesis... Juna Zamenhof restis sola en sia penado...

Estis tragiko de la Zamenhofa vivo, ke lia profesio ne identiĝis kun lia deziro – dediĉi sin al filologio. Li obeis sian patron kaj studis medicinon en Moskvo, kien li forveturis en j. 1879. Li submetiĝis eĉ al la patra deziro, ke li – ĝis fino de la universitataj studoj – tute ĉesu labori por sia nova lingvo. Li obeeme transdonis al sia patro ĉiujn manuskriptojn: la gramatikon, vortaron, tradukojn. Triste li adiaŭis kun tio, sed la vivo vokis...

Post du jaroj de modesta studenta vivo en Moskvo, en 1881, li revenis Varsoŭon por daŭrigi tie la universitatajn studojn. Li esperis, ke lia patro liberigos lin de la eldevigita promeso kaj redonos al li la manuskriptojn de lia laboro. Sed atendis lin doloroplena seniluziigo...

La patro – dum lia neĉeesto – konsiliĝis kun siaj kolegoj, profesoroj, pri la lingva intenco de sia filo. Kaj ĉiuj avertis: «Tio, pri kio strebas la juna studento, estas nura utopio, junaĝa revado, vana disigado de fortoj, sed ankaŭ danĝera agado, povonta evoluigi eĉ mensan malsanon. Li estas ja tiel malforta, eĉ freneziĝi li povus!» Tial la patro – pro timo pri sano de sia filo – ĉiujn liajn manuskriptojn, penan laboron de multaj jaroj, bruligis.

Sed tio, kion neniigis fajro, estis bone enskribita en la memoro de Ludoviko. Tamen, kia doloro por la sentema junulo. Li denove ekkomencis. Dum kvin jaroj li kun neniu parolis pri sia verko, sed daŭre pri ĝi laboris. Konstanta abnegacio kaj kaŝado de tio, kio estis por lia koro la plej kara, gravmienigis lian vizaĝon...

En 1885 li finis siajn universitatajn studojn, kiujn li poste ankoraŭ kompletigis per studado de okulmedicino en Vieno. Kiel faka okulkuracisto li komencis sian praktikadon en malriĉa kvartalo de Varsovio. Li volis helpadi precipe al malriĉuloj. Li pli pensis pri aliuloj ol pri si mem. Sed enspezoj estis etaj, ne sufiĉis...

Dum ĉiuj ĉi malfacilaĵoj li ne forgesadis sian idealon. Li preparis sian laboron por preseldono, sed li vane serĉis eldoniston kaj propra mono por eldono ne sufiĉis. Li jam malesperis ...

Sur tiama firmamento de liaj tagoj subite ekbrilis stelo. La amo. De Kovno al parencoj en Varsovio alveturis fraŭlino Klara Silbernik. Li konatiĝis kun ŝi kaj konfidis eĉ sian intencon... Ŝi komprenis liajn noblajn planojn kaj menciis al sia patro Aleksander Silbernik pri malfacilaĵoj de la juna aŭtoro.

Tiu ĉi ekkonis en Zamenhof grandan idealiston kaj plenumis lian deziron: la 26.7.1887 aperis la lingva libreto de Zamenhof kaj la 9.8.1887 sekvis la geedziĝo. Tio estis kurioza, sed valora donaco al la fianĉino. Nur estaĵo tiel delikatsenta kapablis taksi ĝian grandecon kaj fariĝi sindona helpantino en batalo, kiu al ambaŭ nun komenciĝis: por la ĉiutaga pano kaj por disvastigado de ideo de la tuthomara interkompreniĝo.

Titolpaĝe de tiu ĉi unua lernolibro estis teksto: «Doktoro Esperanto: La Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Por Rusoj.» La lingvo mem ne havis nomon. La aŭtoro subskribiĝis per pseŭdonimo «Doktoro Esperanto» (t.e. doktoro esperanta pri interkompreniĝo de nacioj). La aŭtoro pseŭdonimo baldaŭ identiĝis kun la lingvo, kiu komencis esti nomata simple: «Esperanto».

Pluaj 18 jaroj – de 1887 ĝis 1905 – pleniĝis por Zamenhof kaj lia familio per suferadoj kaj zorgoj. La enspezoj el la medicina praktiko ne sufiĉis, li devis konstante akceptadi subtenon de sia bopatro, kio tre ĉagrenadis lin. Dumtage li vivis por siaj malsanuloj, vesperojn kaj noktojn prenadis Esperanto, al kiu li dediĉis sin per sia tuta koro, sed kiu panon ne donis... Male, ĝi postuladis oferojn konstante pli kaj pli grandajn ...

Sed Zamenhof ne rezignis: li skribadis artikolojn por diversaj gazetoj, esperantigadis diversajn verkojn, ekzemple la tutan Biblion. Kaj tiamaniere Esperanto komencis malrapide disvastiĝadi tutmonde, precipe helpe de oferemaj unuopuloj, kiuj troviĝis en la tuta mondo. Plinombriĝadis Esperantogazetoj, komencis aperadi eĉ libroj en Esperanto – tradukoj el naciaj lingvoj kaj eĉ originaloj.

Ununura demando restis ankoraŭ ne solvita: ĉu helpe de Esperanto kapablos interkompreniĝi diversnaciaj personaj kontaktoj? Kiamaniere pruvi tion? La respondo donis la 1-a mondkongreso de esperantistoj, okazinta en 1905 en la franca urbo Boulogne-sur-Mer, kiun partoprenis pli ol 700 esperantistoj el la tuta mondo.

(daŭrigota)

Senpaga eldonado

Ĉeĥa firmo **Bez vydavatele** (*Sen eldonisto*) ebligas publikigi librojn en elektronika formo. Inter ili troviĝas ankaŭ libroj tradukitaj el Esperanto fare de Jindřiška Drahotová. Ŝiajn librojn vi trovos ĉe **www.bezvydavatele.cz**, sufiĉas en la serĉilon enskribi ŝian nomon.

Ankaŭ vi povas enmeti viajn librojn, se vi ion verkis aŭ tradukis.

Tradukoj en la ĉeĥan

Jam dudek jarojn mi tradukas el Esperanto al la ĉeĥa lingvo. Sur niaj paĝoj **www.mlboleslav.cz/esperanto** troviĝas klasikaj esperantaj libroj: Danĝera lingvo de Ulrich Lins, Verda koro de Julio Baghy, Vivo de Andreo Cseh de Ed Borsboom, Bona Espero – idealo kaj realo de Roman Dobrzynski, Reĝo Maĉjo la Unua de Janusz Korczak, Kredu min sinjorino! de Cezaro Rossetti, Kromozomoj de Lorjak, Notoj el Irano de Tereza Kapista, Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto de Lucien Peraire, Fabeloj el la tuta mondo, pluaj libroj estas preparataj. Tiuj libroj estas ekskluzive elektronikaj kaj libere elŝuteblaj.

Krome mi eldonas „LIBRETOJN – kun verda birdo“ proprakoste. Jam aperis 8 volumoj. La volumoj I. kaj II. jam estas disvenditaj, pro tio mi ilin metis sur niajn paĝojn **www.mlboleslav.cz/esperanto**, kie ili estas libere elŝuteblaj. Aliaj volumoj estas aĉeteblaj ĉe mi. Ĉar la poŝtpago estas la sama, kiel la prezo de la libreto mem – unu volumo 50 kronojn aŭ 2 eŭrojn – mi povos veturigi la libretojn

al Svitavy aŭ al Skokovy en Ĉeĥa paradizo, kie okazos la 38-a seminario, aŭ al konferenco ĈES en Nymburk, kiu okazos de la 25-a ĝis 28-a de oktobro 2013.

El mia propra verkado mi sendas ion por gustumi en aldonajo (sube).

Jindřiška Drahotová

Sadová 745, Mladá Boleslav 293 01
Ĉeĥio, telefono 420 720 652 320,
drahotova@esperanto.cz,

Aldonaĵo:

Ŝoforo kaj ŝoforino reciproke kraŝas. Ambaŭ aŭtomobiloj detruigis, sed homoj ne estas vunditaj.

Kiam ili eliras el siaj difektitaj vrankoj, la virino diras al la viro: „Vidu, vi estas viro, mi virino kaj vidu niajn aŭtojn, tia domaĝo, sed ni ne estas vunditaj. Certe la dio gvidis niajn vojojn, ke ni renkontiĝu, amikiĝu, eble ni vivu tiel ĝis la morto.“

Kaj la virino daŭrigas: „Kaj vidu pluan miraklon, mia aŭtomobilo estas tute nuligita, sed tiu ĉi botelo da konjako restis sen difekto. La dio certe deziras, ke ni komune trinku kaj omaĝu nian feliĉon,“ kaj prezentas al la viro botelon.

Li kapjesas, la botelon malfermas kaj profunde trinkas, poste la botelon redonas al la virino.

Ŝi la botelon ŝtopigas kaj redonas al la viro en manon.

Li demandas: „Ĉu vi ne trinkos?“

Ŝi respondas: „Ne, mi atendas, ĝis venos policistoj.“

Lasta adiaŭo

rakonto de Pavla Zemanová

Vi ĉiuj certe konas kobajon. Ĝi estas harara, kun haroj, longaj kaj mallongaj. Ĝi estas parolema, eterne malsata besteto. Ĉi tiun rakonton skribis sorto mem kaj ĉefan rolon en ĉi tiu rakonto ludis Butoneto Andy Mar, kobajo de raso *rex*. Ĉiuj konis Butoneton: multo da bredantoj, esperantistoj, sed ankaŭ loĝantoj de Hejmo de sankta Karolo Boromea en Prago memoras ĉiam ridetantan kobajon kun ĝojo en okuloj. Butoneto ankaŭ ricevis nomon „Muntisto Venceslavo“. Ĝi scipovis ĉion dismunti, ĝi sciis kiel ludi kun ludiloj por kunikloj kaj por hundoj. Ĝi ofte vizitadis teejon.

La kelneroj bone konis ĝin, ili ĉiam portis al ĝi ĝian ŝatatan trinkaĵon „Juna hordeo“. Butoneton oni konis ankaŭ en kafejo „Desegnu“, en organizaĵo „Libereco de bestoj“. Oni povis vidi ĝin ankaŭ en „Pedigree maratono kun hundoj“ kie ĝi dufoje staris kun starta numero kiel kuranto. Ĝi tamen ne kuris, ĝi estis fiere portita en miaj manoj. Ĝi ankaŭ gajnis titolon „Grandĉampiono de Ĉeĥa respubliko“ okaze de ekspozicio de kobajoj. Dum tri jaroj ĝi agis multe. Ĝi disdonadis ĝojon, ĝi kuracis kaj helpis. Ĝi estis ankaŭ mia persona terapeŭto, ĉar mia embuska malsano kelkfoje montris dentojn. Bedaŭrinde okazis tio, kion neniu atendus. Dum unu julia tago mi havis simpton de infarkto. Mi vidis, ke ankaŭ Butoneto malbone spiras. Al mi helpis piloloj sed Buto-

neto mortis pro infarkto.

La 31-an de julio ni laste adiaŭis kun Butoneto. Mi estas katoliko, pro tio mi parolis kun pastro Lukaš Lipensky O.Cr., kiu adiaŭon en preĝejo preparis. Li ja Butoneton bone konis. Butoneto ofte vizitadis kun mi la preĝejon. Kelkfoje ĝi ricevis antaŭ besta ekspozicio de la pastro sanktoleadon. La tutan antaŭtagmezon mi sentis min bone, sed posttagmeze, kiam mi donis mortocindran urnon en sakon, komencis ruli sur miaj vangoj grandaj larvoj.

Kiam mi venis al la preĝejo de sankta Petro, mia koro forte batis. Mi sidiĝis sur benkon en la preĝejo kaj ekmeditis. Origine mi volis post funebra ceremonio forveturi iun tagon en vilaĝon Svátý Jan pod Skalou, kaj tie fari disigon de cindro. Butoneto ĉi tiun lokon amis. Kelkfoje manĝis herbon en monaĥeja ĝardeno, vizitis kavernon de sankta Ivano kaj trinkis kuracan akvon el puteto Ivanka. Sed la vilaĝo estas malproksima de mia urbo. Kiel mi vintre vojaĝus al Butoneto flamigi kandelojn? Dum pripensado mi ekrigardis angulon de la preĝejo. En la angulo staras kruco kun Kristo, statuo de sankta Petro kaj ŝtonaj bretoj kun Dek Ordonoj. Jes, ĉi tie Butoneto ripozos. Ĉe nia Kreinto. La kandelon aŭ floron mi povos porti kiam ajn. Mi malrapide venis en la preĝejon kaj sidiĝis en mian lokon. Komenciĝis normala meso. Dum solenaĵo de eŭkaristio mi sentis alian impreson de Krista korpo, ol en alia tago.

La impresio estis pli dolĉa. Kiel Kristo donus al mi pli grandan forton, ke mi pli bone interbatalu kun malĝojo en koro. Post fino de la meso diris pastro, ke mi sidu kun urno en benkon antaŭ Virgulino. Mia avino kun amikino Jindra portis al Butoneto kroneton el rosmarino kaj mirto. Se estus Butoneto viva, certe ĝi la kroneton formanĝus. Mia amikino Katka alportis floron. La pastro komencis funebran ceremonion. Li havis nigran stolon kun ora brodaĵo kaj en manoj tenis libron de funebraj ceremonioj. En tiu momento mi vidis pro larmoj nenion. La pastro legis naŭan psalmon. Poste sekvis Patro nia kaj poste la pastro parolis pri bela vivo de Butoneto kaj pri mia perfekta prizorgo de bestoj. Li parolis, ke multaj homoj povus lerni de mi, ĉar mi amas bestojn ne nur kiel bestoj, sed ankaŭ kiel diaj kreaĵoj. Poste la pastro parolis, ke mi ne estu malĝoja, ĉar la Butoneto jam estas feliĉa. Fine la pastro aspergis urnon per benita akvo.

Per ĉi tiu rakonto mi volus danki al pastro Lukaš Lipensky O. Cr. Li faris ĉi tiun netradician ceremonion por morta besteto unue.

Mi dankas al la pastro.

Lernu!

Kun preskaŭ 150 mil registritaj uzantoj, Lernu.net estas la plej granda Esperanto-retejo en la mondo, kaj kun via helpo, lernu! povas esti eĉ pli granda, forta kaj konata! Estas pluraj

manieroj kunlabori – jen kelkaj ebloj!

1) Reklami Lernu.net kaj Esperanton! Diskonigu per sociaj retejoj (Facebook, Google+ ktp.). Lernu.net nun havas kanalon ĉe YouTube, kie estas versioj de reklamvideo kiu gajnis konkurson ĉe lernu! en 2011. Ni invitas ankaŭ vin proponi viajn videojn pri Esperanto aŭ pri lernu! en nia kanalo! Nia kanalo troviĝas ĉe <http://www.youtube.com/channel/UCErTOQ64FUpTke7LDJfjvawQ>.

Por proponi vian videon, nur kontaktu nin ĉe teamo@lernu.net.

2) Fariĝi tradukanto aŭ lingvohelpanto por lernu! Kiel vi certe scias, Lernu.net baldaŭ lanĉos la novan, plibonigitan paĝaron. Se vi ankoraŭ ne estas en la volontula teamo de Lernu.net, ni elkore invitas vin fariĝi lernu!-volontulo. Vi povas labori tiom multe (aŭ tiom malmulte), kiom vi povas! Kontaktu teamo@lernu.net kun eventualaj demandoj, aŭ vizitu ĉi tiun paĝon por fariĝi tradukanto: http://lernu.net/pri_lernu/kunlaborantoj/tradukantoj.php.

3) Finance subteni Lernu.net. Vi povas fari unufojan donacon al Lernu (http://eo.lernu.net/pri_lernu/subteno/donaco.php) aŭ starigi monatajn donacojn al ESF – la fondaĵo, kiu ebligis la kreon kaj kiu jam pli ol 10 jarojn subtenas Lernu.net:

<http://esperantic.org/eo/donacoj/rete>. Amike kaj dankeme, la teamo de lernu! kaj ESF teamo@lernu.net.

KLUBA VIVO



Česká Lípa-Nový Bor: Geanoj de E-kluboj Česká Lípa kaj Nový Bor, kiuj renkontiĝis la 11-an de julio 2013 en restoracio „U Bohouše“ en Česká Lípa, por soleni grandan tagon de Antonín Štřelba (100 jaroj!). Jubileanto staras en la mezo kun bukedo da floroj.

Brno: La 63-a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu daŭris unu semajnon, komenciĝis en Svitavy la 3-an de aŭgusto 2013. La ĉefa fervojstacio en Brno tiam estis parte riparata, tial Oldřich Arnošt Fischer helpis al grupo de kvin rumanaj KELI-anoj trovi vojon al la fervojstacio en la



kvartalo Brno-Židenice. Li montris al ili parton de historia centro de Brno (Leg-

ma Foirejo, Kapucena Placo, Teatro Reduta k.a.) parolante interalie pri esperantista movado en Brno.

Foto: La rumanaj KELI-anoj en la fervojstacio Brno-Židenice, *de maldekstre:* Ecaterina Popoviciu, Zita Filepp, Antal Farkas, Tereza Scurt kaj Maria László. *Fotis:* O.A. Fischer

Písek: EK gastigis somere pere de Pasporta Servo esperantistojn el Japanio kaj Singapuro kaj montris al ili belaĵojn de la regiono. En aŭgusto ĝi prizorgis migran ekspozicion pri Esperanto en la Urba kulturcentro en Vodňany, pri kiu estis retroŝte informitaj komunum-estaroj, kulturaj kaj klerigaj instancoj kaj amaskomunikiloj en la tuta distrikto Strakonice. La 7-an de septembro la klubo organizis samurbe la **7an POST-FERIAN RENKONTIĜON**, ĉi-foje kadre de la Solenaĵo de vaporo, omaĝe al 120-a datreveno de alveno de la unua vaportrajno al la urbo. Krom partopreno en la kultura programo de la solenaĵo, partoprenintoj (ne nur el Suda Bohemio) ĝuis esperantlingvan ĉiĉeronadon tra la urbocentro kaj tra la Urba Galerio kaj mallongan lingvoklerigan programon, ĉi-foje kun la temoj „Trajnoj“ kaj „Fiŝoj“ (ĉar Vodňany estas ligita kun tradicio de fiŝbredado). En junio la klubo fondis sian kanalon en la retejo Youtube kaj ĝis nun alŝutis al ĝi ĉ. 25 siajn mallongajn videojn, plejparte el interesaj kulturaj aranĝoj en la urbo kaj la regiono. La filmetoj havas dulingvan priskribon kaj hazardaj vizitantoj kaj interesitoj pri la temo tiel povas renkontiĝi kun Esperanto en la rolo de la kultura informperanto. La klubo esperas tiel atentigi samurbanojn, vizitantajn la retejon, pri sia ekzisto kaj sekve ev. trovi ankaŭ novajn potencialajn membrojn kun kulturaj intereso.

Cena Ď

Cena Ď (www.cena-d.cz), založena na obyčejném slově „děkuji“, byla vyhlášena v roce 2013 již potřinácté. Vyhlášení celostátní ceny se konalo, jako každý rok, v Národním divadle v Praze, kde se v jednu chvíli na jednom místě sjedou z celé republiky pořadatelé hodnotných kulturních a charitativních projektů a ti, kteří je podporují – mecenáši a dobrodinci. Mezi nominovanými byla i **Jana Brancuzská** z kroužku **Přátelé esperanta** v Moravských Budějovicích, která byla nominovaná za svoji dlouholetou dobrovolnickou činnost pro seniory v Domě sv. Antonína v Moravských Budějovicích a prošla do užšího výběru v regionálním kole Kraje Vysočina. První tři nominovaní v Kraji Vysočina postoupili do celostátního kola v Praze.

Dopoledne 20. června, v den konání slavnostního vyhlášení Ceny Ď, byli nominovaní za Kraj Vysočina pozváni senátorem za Kraj Vysočina panem RNDr. Milošem Vystrčilím na prohlídku Senátu Parlamentu České republiky (obr. 1.). Památkou na tento významný den je společná fotografie senátora RNDr. Miloše Vystrčila s reprezentanty Kraje Vysočina a jejich doprovodem na balkonu jednacího sálu Senátu (obr. 2.).

Odpoledne bylo na slavnostním vyhlášení Ceny Ď v Národním divadle v Praze uděleno 14 celostátních Cen Ď 2013 a vybrán vítěz ze 14 krajů, MUDr. Věra Domorázková, která obdržela GRAND PRIX Ď 2013 za podporu Nadace Matějská naděje. Při vyhlášení vítězů krajských Cen Ď moderátor a „otec Ceny Ď“ pan Richard Langer konstatoval, že celkový počet nominovaných je 291, počet Cen Ď je omezený a k některým nominovaným může být rozhodnutí kolegia nespravedlivé. Uvedl, jako příklad, že ocenění by si za svou činnost zasloužila i Mgr. Jana Brancuzská, za

svoji mnoholetou muzikoterapeutickou činnost v Domově sv. Antonína v Moravských Budějovicích. Velký potlesk vstoje si zasloužila pí. Věra Čáslavská za udělení ceny „Morální vzor“, která byla letos udělena podruhé; v minulém roce ji obdržel kardinál Dominik Duka.

Společná fotografie na jevišti Národního divadla celou akci ukončila.



Obr. 1.: Senátor RNDr. M. Vystrčil v roli průvodce v Senátu ČR. (J. Brancuzská s bílou kabelkou; foto Ing. M. Brzek, asistent senátora).



Obr. 2.: Společná fotografie v jednacím sálu Senátu. (Senátor RNDr. Miloš Vystrčil 3. zprava ve 3. řadě, foto Ing. Miroslav Brzek, asistent senátora)

Resumo: Premion D (= Dankon) ricevas personoj, kiuj senpage laboras por aliaj. La 20-an de junio 2013 en Nacia Teatro ricevis la premion ankaŭ esperantistino Jana Brancuzská el Moravské Budějovice pro sia multjara muzikoterapia laboro en la Domo de Sankta Antonio (por maljunuloj kaj handikapuloj).

Individuaj membroj el Ĉeĥio

la kotizoj por la unuopaj kategorioj (MA, MJ, MG) por la jaro 2014 ankoraŭ ne estas konataj, tamen certe ili estos plialtigitaj pro du kialoj: malfortiĝo de la ĉeĥa krono kompare al eŭro, kaj krome ioma altiĝo de la kotizoj en EUR. Sed se vi pagos antaŭ la 20-a de septembro (por ke ĝi atingu la konton de ĈEA sufiĉe frue, tiel mi povos anonci tion al UEA ĝis la fino de septembro), vi povas uzi ankaŭ por la jaro 2014 la ĉi-jaran tarifon, do 1050 Kč kiel MA (membro kun la revuo en papera formo), 420.- por MJ (kun nur Jarlibro kaj reta revuo), 170.- kat. MG (nur gvidlibro, sed aliro al la reta Jarlibro kaj revuo Esperanto). Se vi havas ajnan demandon, bv. direkti ĝin al mi, sed nur ekde lundo la 16-a, ĉar ĝis tiam mi estos en Alpoj verŝajne sen eblo retumi.

CZ-ĉefdelegito Petro Chrdle, 736 645 455, chrdle@kava-pech.cz

PLI OL 4000 ŜATANTOJ DE UEA EN FACEBOOK

La nombro de ŝatantoj de la paĝo de UEA en la socia retejo Facebook ("Vizaĝlibro") atingis 4000 la 7-an de septembro. La paĝo estis kreita la 5-an de novembro 2009, kaj unu jaron poste ĝi jam havis 1738 ŝatantojn. Poste la kresko malrapidiĝis, sed ĉi-jare la ritmo denove plivigliĝis.

Kun 585 ŝatantoj Brazilo daŭre estas sur la unua loko, kun ĉiam pli granda distanco al Usono (366). Aliaj landoj kun multaj ŝatantoj estas Francio

(221), Pollando (182), Italio (178), Hispanio (174), Meksiko (130), Germanio (122), Argentino (114), Rusio (103), Hungario (83), Britio (78), Japanio (76), Nederlando (66), Kanado kaj Malajzio (po 60), Belgio (58), Ĉilio (57), kaj Kolombio kaj Vjetnamio (po 55).

En marto, kiam la paĝo atingis la nombron de 3500 ŝatantoj, San-Paŭlo estis la unua en la urba statistiko, sed intertempe Rio-de-Janeiro klare superis ĝin kun 84 ŝatantoj, dum en San-Paŭlo loĝas 65 ŝatantoj. Sekvas Parizo (49), Bonaero (45), Hanojo (39), Budapeŝto (37), Moskvo (35), Meksikurbo kaj Seulo (po 33), Vilno (32), kaj Madrido kaj Santiago de Ĉilio (po 31).

La seksa distribuo restas praktike sama ekde la komenco: 71,1% de la ŝatantoj estas viroj kaj 27,4% virinoj (la sekso de 1,5% ne estas konata). La proporcio de viroj estas do iom pli granda ol inter la individuaj membroj de UEA, el kiuj 66% estas viroj kaj 31% virinoj (sekso de 3% ne konata).

Per Facebook UEA atingas publikon multe pli junan ol la kotizanta membraro, el kiu pli ol duono aĝas pli ol 60 jarojn. Entute 60,0% de la ŝatantoj en Facebook estas malpli ol 45-jaraj (41,3% aĝas malpli ol 35 jarojn; 18,7% estas 35-44-jaraj). Krome, 17,5% estas en la grupo de 45-54 jaroj kaj 11,9% en tiu de 55-64 jaroj. Pli ol 64-jaraj estas 9,1% de la ŝatantoj. Ne konata estas la aĝo de 1,2%.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Jubileoj

Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Stanislav Kamarýt** (10.11.1883-30.6.1956), pionira kaj gvida persono de nia movado. Li postlasis verkojn *Mezinárodní jazyk* (1921), *Filozofia vortaro* (1933), *Historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio* (postmorte 1983). Kun Oto Ginz li kunredaktis *Ĉeĥoslovakian Antologion*, por kiu li ankaŭ tradukis.

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Jiří Vítězslav Šamla** (17.9.1913-14.5.1994), kiu multe tradukis por Verda Stacio en Brno kiel 20-25-jara junulo (*Sur rozoj sternite, Lunatika, Forta karaktero, Forlasita, Pola sango, Vendita fianĉino*), verkis lernolibrojn de Esperanto kaj eĉ ĉeĥlingve poeziis. Post la milito li dediĉis sin al verkoj pri citrusoj.

La saman 100-jaran jubileon festas ankaŭ muzika profesoro **Štěpán Urban** (14.10.1913-4.5.1974) konata ekstermovade pro siaj muzikologiaj verkoj. En la movadon li enskribiĝis sub la nomo Stefo Urban per siaj rakontoj (*La sorĉisto, La forlasita gitaro*) kaj sia poezio (*Nova Ezopo*).

La 90-jaran datrevenon de **Josef Chvosta** (25.9.1923-11.2.1997) ni rememoru per liaj instruaj tekstoj *Konversacio* (20 temoj aperis en Starto) kaj liaj tradukoj el Hašek, Čapek, Švandrlík, Jirásek (F. L. Vek, en manuskripto) k.a.

Jam 25 jaroj pasis post la morto de **Jiří Kořínek** (1.10.1906-4.11.1988), unu el la plej grandaj majstroj de Esperanto, kiu postlasis centojn da tradukitaj poemoj kaj operaj arioj, ne mankas ankaŭ tradukoj prozaj, nek verkoj originalaj. El pli ampleksaj verkoj ni menciuj poemarojn *Panjo* de Jaroslav Seifert, *Flugilhava ŝtono* kaj *Serĉado de blua*

tono de Jiří Karen, *Sur la sojlo de la amo* de Markéta Procházková, *Nia sinjorino Božena Němcová* de František Halas, *Sileziaj kantoj* de Petr Bezruč (kun R. Hromada kaj T. Pumpr), dramon *Manon Lescaut* de Vítězslav Nezval laŭ rakonto de Prévost kaj operon *Jakobeno* de Antonín Dvořák laŭ vortoj de Marie Červinková Riegrová.

Antaŭ 20 jaroj forlasis nin aktoro **Ota Sklenčka** (19.12.1919-10.10.1993), ĝis la morto membro de nia asocio. Li estis filo de gravaj esperantistoj Otto Sklenčka (1891-1962) kaj Božena Sklenčková (1897-1983), nevo de Ota Ginz kaj kuzo de Petr Ginz. Li rolis en 85 filmoj, akiris titolon nacia artisto.

Zdeněk Hršel – 85

La honora membro de nia asocio ĝisvivas la 19-an de septembro 2013 sian 85-jariĝon. La junaĝon li travivis en Hradec Králové, sed sian maturan vivon en Brno. Li studis filologion kaj laboris en teĥnika biblioteko. En EK Brno li aktivis kiel kluba sekretario kaj poste prezidanto.

Li kompilis esperantlingvan literaturon en Moravia Landa Biblioteko, kunlaboris ĉe preparo de la *Historio* de Kamarýt, por *Propra biografio de Karolo la Kvara* (tr. J. Vondroušek) li kolektis riĉajn komentojn kaj klarigojn. Li iniciatis kaj gvidis preparon de nova vortaro, kies finan redakton plenumis Karel Kraft. Por Moravské Budějovice li esperantigis retejon kaj por Brno flugfolion *Brno-ĝusta direkto*. Jam plurajn jarojn li kompilas bibliografion de Miloš Lukáš, kies lernanto li estis en gimnazio de Hradec Králové.

KALENDARO 2013

2013-09-07 La 7-a Postferia Renkontiĝo en Vodňany, Info: pisek@esperanto.cz

2013-09-07 La 90-jariĝo de EK Přerov Info: tonda.krejcir@seznam.cz

2012-09-12/13 Skolta solenaĵo kaj senvualigo de E-Monumento en Kopřivnice

Info: khyvnar@seznam.cz

2013-09-16/22 Aŭtuna seminario Skokovy

Info: drahotova@esperanto.cz

2013-09-20/22 Arkones, Poznan

Info: tobiasz@esenco.org

2013-09-27/29 Jubilea Solenaĵo en Svitavy,

Info: svitavy@esperanto.cz

2013-10-16/20 La 2-a Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

2013-10-25/28 ĈEA-Konferenco en Nymburk,

Info: cea@esperanto.cz

2013-11-08/10 Fervojista konferenco en Praha

Info: cefea@centrum.cz

2013-11-30 AnkRo en Pisek,

Info: pisek@esperanto.cz

2013-12-08 Marcipana Kristnasko Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

Ni kondolencas

- la 6-an de julio 2013 mortis s-ino Květa Strýhalová (90-jara) el Hradec Králové

- la 20-an de julio 2013 forpasis s-ino Eliška Kunertová (80-jara) el Lanškroun

- la 27-an de julio 2013 forpasis s-ino Eva Hoffmannová (74-jara) el Prago

- la 29-an de julio 2013 mortis s-ino Helena Maudrová (88-jaroj) el Prago

Jiří Harcuba

(1928-2013)

La 26-an de julio 2013 forpasis mondfama artisto kaj esperantisto profesoro Jiří Harcuba, aŭtoro de la ĉeĥa 5-krona monero,

de la ŝtata Medalo por Meritoj kaj de multaj aliaj reliefoj kun portretoj de gravuloj, kiuj troviĝas en kolektoj tra la mondo. Por ni li faris medalon kun bildo de monumento al Zamenhof en Františkovy Lázně (1914), kiun detruis faŝistoj.

Herrman Behrmann

(1935-2013)

La fama germana esperantisto, fondinto de Esperanto-Centro Paderborn, forpasis la 29-an de junio 2013. Li varbis por Esperanto profesoron Helmar Frank kaj mem famiĝis per novaj instru-metodoj (Esperanto programita, lingvo-orientiĝa instruado).

IVO BOROVIČKI

(1924-2013)

D-ro Ivo Borovečki, Honora Membro de UEA, forpasis la 23-an de julio en Pula (Kroatio). Dum la Dua Mondmilito li aktive partoprenis en la kontraŭfaŝisma batalo. Li doktoriĝis en la Medicina Fakultato de Zagrebo en 1952.

Li estis komitatano de UEA 1951-59, prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio 1951-53 kaj prezidanto de LKK de la 38-a UK en Zagrebo en 1953. De 1953 ĝis 1956 li estis redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Zagrebo. Li estis lekciisto pri Esperanto ĉe la Ekonomika Fakultato en Zagrebo 1955-56. En 1959 li gvidis kurson en Adis-Abebo kaj starigis la unuan Esperanto-grupon en Etiopio. Li estis kursgvidanto ankaŭ en sia hejmlando kaj prezidanto de la Esperanto-societo "La Adriatika Stelo" en Pula. Kunredaktoro de *La Suda Stelo* 1947-50. Ekde 1955 li multe tradukis el la kroata poezio; liaj tradukoj aperis en multaj Esperanto-gazetoj kaj antologioj.

(Laŭ Gazetara komuniko de UEA)

Jak platit svazu

Pozor, změna účtu!

Nyní Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Zájemci o časopisy

Pozor na změnu telefonního čísla!

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. **311 241 406**, polnický@quick.cz. Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1040,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 620,-Kč
La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: 570,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

Juna Amiko: 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5

Literatura Foiro: 1160,- Kč (*770,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

Femina: 770,- Kč (*510,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

Česko-esperantská frazeologie

Jednou z nejúspěšnějších esperantských publikací letošního roku je **Frazeologie** Josefa Cinka, která stojí 160 Kč u Libroserva. Zvýhodněnou cenu 120 Kč při zakoupení 3 ks (a více) lze získat u vydavatele knihy (bližší informace u bohula@centrum.cz). Kniha má 325 stran.

**Periodikum Českého
esperantského svazu - 44. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

**Předplatné v Česku (bez členství ve
svazu): 200 Kč**

Členská evidence a změny adres:

**p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice, vhirsx@email.cz, tel.
517 444 117**

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2013

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
- - 43-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

Ĉeĥio, malovec@volny.cz

<http://members.chello.cz/malovec/>

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva numero:
15.11.2013**

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

**EK „La Ponto“ invitas vin al la tradicia
AnkRo – ANTAŬKRISTNASKA
RENKONTIĜO**

**sabate la 30-an de novembro 2013
en Písek**

**Ekde 10:00 La 5-a Kultura matineo en
klubejo de la Urba Biblioteko**

**Tagmeze eta promeno tra la urbo
Ekde 13:15 Posttagmeza programo
komponita el kristanaj kaj popolaj
adventaj kaj kristnaskaj tradicioj (en
„ĉevalejo“ de la paroĥejo Písek)**


**Aliĝoj kaj pliaj informoj:
pisek@esperanto.cz, tel. 774 942424**

**EKSPOZICIO „ĈU ESPERANTO ES-
TAS MORTA LINGVO?“ EKMIGRIS
TRA NORDA MORAVIO**

**Ekde 12.9. ĝis 13.10. la ekspozicio
viziteblas en Kopřivnice (Muzeum Fojt-
ství, Záhumní 1) - ĉiutage krom lun-
doj ekde la 9-a ĝis la 17-a (en septem-
bro), resp. la 16-a (en oktobro). Dum la
monato novembro la gastiganto estos
urba Biblioteko de Petr Bezruč en
Opava, Nádražní okruh 27. Pluaj lokoj
estas nuntempe pritraktataj. Bv. dis-
konigi la informon kaj inviti viajn ge-
amikojn loĝantajn en la ĉirkaŭaĵo! Ĝis
nun la projekton gastigis 22 institucioj
(plejparte bibliotekoj, sed ankaŭ muzeoj,
altlernejoj k.a.) en 19 urboj de 8 regionoj
de la tuta Ĉeĥio. La reta fotogalerio
troviĝas en**

http://esperanto1.rajce.idnes.cz/Putovni_vystava_Je_esperanto_mrtvy_jazyk/

**Ĉu vi interesiĝas okazigi la ekspozicion
ankaŭ en via urbo? Bv. kontakti Pavla
Dvořáková (adreson kaj telefonnumeron
vidu sur la 2-a paĝo de Starto).**




Diplomo pri konkurso de infandeseĝnoj en Pířerov



Ekspozicio pri Esperanto akompananta la ekspozicion de infanaj deseĝnoj en Pířerov



Ekspozicio de infanaj deseĝnoj pri birdoj en Pířerov



KELI-anoj vizitis nian muzeon en Svitavy



Kun la biblioteko en Aalen ni interŝanĝis librojn (duoblaĵojn)



Peter Zilvar kaj Marek Blahuš antaŭ busto de Zamenhof en Herzberg